

**Protokolo de la Ĝenerala Asembleo de AIS je 2004-02-21**, 16h20 – 17h50, en *Humboldt-Universität Berlin, Spandauer Str. 1*

Partoprenantoj: *Profesoroj Frank (prezidanto), Wickström (trezoristo), Bociort, Fössmeier, Kauffmann. Gastoj: Dipl.-Ing. Bartos, Dr. Macko.*

La kunveno unuanime decidas, ke SUS 27 okazu inter 2004-08-29 kaj 2004-09-04 en Komárno (SK).

7 *Ceteraĵoj*

La sekva ĜA okazu je 2004-06-12 en Freising (DE).

Berlino, 2004-02-21      Protokolis: *R. Fössmeier*

1 *Formalaĵoj*

Al la kunveno estas skribe kaj ĝustatempe invitite per letero de 2004-01-23. La kunveno do estas decidpova.

La kvin ĉeestantaj kaj ok reprezentataj membroj ne ŝuldas kotizojn kaj do rajtas voĉdoni. Ne estas objektoj kontraŭ la ĉeesto de dipl.-ing. Bartos kaj Dr. Macko kiel gastoj.

La tagordo el la invito estas unuanime akceptita.

2 *Raporto de la prezidanto kaj de la trezoristo. Perspektivo 2004/05.*

La prezidento referencas al sia jarfina cirkulero de 2003-12-19 kaj suplementas, ke je 2003-12-23 okazis inspekto de akireblaj nemoveblaĵoj en Komárno (SK). Se la akiro de tiuj nemoveblaĵoj efektiviĝos, en la unua duono de 2005 jam disponeblas salonoj por nia kleriga laboro.

Por la bilanco de 2003 mankas finkalkulo de SUS 26. Ĉio alia estas en provizora formo disdonata al la partoprenantoj. La kunveno unuanime postulas, ke la eksa senata sekretario, ADoc. Joanna Lewoc, senprokraste disponigu la finkalkulon de SUS 26 kaj transpagu la saldon al AIS-konto.

3 *Senŝarĝigo*

Pro la manko de la finkalkulo kaj (tial) de revizora raporto ne povas okazi senŝarĝigo.

4 *Elektoj*

Ne okazas.

5 *Buĝeto 2004, perspektivo 2005*

Buĝeto por 2004 estas prezentata en provizora formo. Necesas detaligo.